

Boletín

JULIO

1957

PELAYO. 7

VALENCIA

(ESPAÑA)

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

¡Y AHORA... EN MARCHA HACIA LA GRAN CAPITAL!

Cuando este número de nuestro Boletín vea la luz de la publicidad, los esperantistas españoles estarán, en su mayor parte, haciendo febriles preparativos para asistir al XVIIIº Congreso Español de Esperanto.

Todos ellos, conscientes de la importancia de su asistencia, estarán repasando en su mente aquellas sugerencias o planes que, puestos en práctica, pudieran dar al movimiento esperantista un decisivo impulso, que le acercara definitivamente a la meta que todos soñamos; esto es, la total utilización del idioma internacional —para todas las actividades culturales y de relación— en todo el mundo. En el transcurso de los últimos decenios, numerosísimos esperantistas, en todos los continentes, se han esforzado en introducir el Esperanto en los medios oficiales; a pesar de la incommovible gravedad de la rutina, han logrado resultados sorprendentes, en parte por sus esfuerzos, pero también en virtud del insostenible estado caótico en que se desenvuelven las relaciones internacionales.

Nuestro inminente congreso, que tendrá, con toda seguridad, un feliz y fructífero desarrollo en Madrid, verá, como todos los años, el jubiloso encuentro de nuestra gran familia esperantista, aumentada, por las circunstancias, con la inestimable aportación de muchos samideanos extranjeros. Pero no será eso solo. Nuestra reunión anual será, esta vez, como una magnífica exposición, ante las autoridades académicas y la Comisión Española en la UNESCO, de lo que el Esperanto es y puede ser, si su gran valor cultural y su gran fuerza de relación es estimada y adoptada por quien puede hacerlo, para que sus beneficios lleguen a todos.

Los esperantistas españoles han luchado y seguirán esforzándose para iluminar el camino del porvenir. Hora es de que la antorcha sea enarbolada por quienes pueden esparcir su luz por todo el ámbito de nuestra España.

Tuj post nia solena tutlanda kunveno en Madrido, okazos la
42ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
 en Marseille, la bela franca mediteranea urbo, kie, en sfero de aŭtentika tutmondeco, miloj da homoj, el plej diversaj landoj, uzante nur unu solan lingvon, kiu trudas nenian servutecon —Esperanto!— diskutos, laboros, festos kaj ekskursos. Al ili, do, en laŭta aklamo de tutkora saluto ni deziras, kun hispana entuziasmo, plenan sukceson.

NENIU SOFISMO POVOS DETRUI LA FAKTON DE NIA EKZISTO!

MANRESA. Okaze de la dek-jara fondiĝo de la poliglota societo «Lingua Club», ĝia Esperanto-Fako organizis, de la 6^a ĝis 12^a de pasinta Majo, interesajn aranĝojn per kiuj fariĝis denove altgrada propagando kaj montriĝis vigla agado, ne nur en la privata kluba medio, sed ankaŭ en la urba vivo, kun favoraj eĥoj en la kulturaj sferoj, profite de la interna samideana aktiveco.

En la jaro 1947^a, aro da esperantistoj transvivintaj la militajn eventojn, kune kun kelkaj amatoroj pri fremdaj lingvoj, konsideris la fakton societe kunveni por efike daŭrigi tiujn jam de longe interrompitajn lingvajn taskojn kaj kontaktojn. Tiel fondiĝis «Lingua Club». Tuj post tio, la esperantista agado atingis altan gradon; kaj pri tio atestas la fakto, ke en la unua postmilita kurso partoprenis cent-tridek lernantoj. De tiam, ĉiujare, okazis elementaj kaj progresigaj kursoj el kiuj eliris la promociitoj, kiuj nun strebas en la klopodado atingi indan lingvonivelon. Tiu ĉi nova samideanaro estas nun preskaŭ la sola rondo, kiu respondece reprezentas kaj gvidas nian movadon en ĉi tiu grava kataluna urbo, ĉar bedaŭrinde ne ĉiu veterano povas resti ĉiam kun bona farto kaj libera tempo por aktiva laboro.

La jubilea semajno disvolvigis laŭ jena aranĝo: Ekspozicio, du prelegoj kaj prezentado de premiita amatora filmo, surbende komentariita en Esperanto. La 9^a de Majo, jaŭde, S-ano F. Pujalá Vallés prelegis, disversante sian altsatatan bonhumoran vervon. Dimanĉe, la 12^a, D-ro Mariano Solá, Viceprezidanto de H. E. F. majstre oratoris kaj plene regaligis la multenombrian ĉeestantaron, prezentante vivan temon pri sociaj, ekonomiaj kaj lingvaj nuntempaj problemoj. Nia vasta klubejo estis nesufiĉa por enteni tiom da gesamideanoj amase venintaj de Sabadell, Tarrasa, Villafranca del Panadés kaj San Vicente de Castellet por, kune kun tiuj de Manresa mem, treege atente aŭskulti kaj entuziasme aplaŭdi la elokventan paroladon de D-ro Mariano Solá. Fine, la esperantigita filmo estis altgrade ŝatata.—M.

BARCELONO. La Esperanta Grupo NIGRAMONTO de la Ekskursiva Centro «Montnegre», same kiel pasinta jaro, la 30^a de pasinta Majo, gaje rendezuis okaze de la 2.^a FRATIGA FAMILIA KAMPFESTO. Nunjare, oni ope kunvenis en «San Feliu de Vila-mil-anys» (Rubi) unu el la plej belaj lokoj en nia regiono, je distanco de 24 km. proksimume. Malgraŭ tio, ke la vetero estis pluvema dum la tuta tago, pli ol 80 gesamideanoj partoprenis en la festo. La nombro certe estas duobla se la vetero estus pli bona. Oni devas do admiri la kurageton de tiuj partoprenantoj, kiuj kun granda dozo da *stoikismo*, akceptis la pluvon sur siajn dorsojn dum la piedirado. Pere de ĉi tiu kroniketo, mi deziras danki denove la gentilecon de S-ro F. Barnola, mastro de la tereno, kie, kun lia permeso, okazis la festo. Cetere, li meritas gratulojn pro la masonaĵoj faritaj ĉirkaŭ la kapelo, kio pruvas la grandan estimon, kiun li sentas por tiel oportuna kaj pitoreska loko.

La momentojn, kiujn permesis la pluvo, oni diligente profitis por sportaj ekzercoj kaj konkursoj, inter la membroj de diversaj grupoj, kun jena klasiiko:

REGULECO

- 1.^a Bernardo Gracia - Encarnación Vilches (Nigramonto).
2.^a Francisco Mayor - Eusebio González (Nigramonto).

VIRA ŜNURTIRADO

- 1.^a B. Gracia - J. Veciana - Francisco Mayor (Nigramonto).
2.^a Morales - Miró - Melis (Aŭroro).

VIRINA ŜNURTIRADO

- 1.^a P. Vigo - P. Martínez - E. Vilches (Stelo de Paco : Nigramonto)
2.^a M. M. Ectanachs - M. D. Ectanachs - R. Vilches (Nigramonto)

KURADO TRA OBSTAKLOJ

VIRA

- 1.^a B. Gracia (Nigramonto)
2.^a F. Mayor (Nigramonto)

VIRINA

- 1.^a A. Baró (Stelo de Paco)
2.^a P. Martínez (Stelo de Paco)

Nu, spite la veteron, ni amuziĝis kaj sukcesis festi en tute agrabla kaj vere familia rondo.

JUAN PEDRET



RAPORTO DE LA ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO POR LA LABORPERIODO JULIO 1956 - JUNIO 1957

Estimataj samideanoj kaj amikoj:

Jen ĉi-sube la kutima ĉiujara Raporto, kiu, kiel oficiala informo de la Estraro, respegulas la laboron de nia Federacio dum la lastaj dek-du monatoj, kalkulante ekde la pasintjara Julio.

ĜENERALA TRARIGARDO

En Raporto por la jaro 1954 (vidu BOLETIN num. 67, paĝo 65) ni skribis: «Estas pruvita fakto, ke la Kongresoj havas grandan valoron, rilate la propagandan efekton al la publiko. Gazetaro kaj radiostacioj raportas pri ili, kaj Esperanto sonas tre efike en la kongresaj urboj kaj en la tuta lando». Ekde la 12^a Hispana Kongreso en Tarrasa (1951) kiu startis al la ĉiujareco de niaj landaj kongresoj post la milito, ni povis konstati tion. La ĉiujara rendevuo de nia diligenta membraro, en elektita urbo el la bela hispana geografio, atestis publike pri nia ekzisto, pruvis la gradojn de nia organizkapablo kaj serioze fidindigis nian Movadon antaŭ altrangaj aŭtoritatoj kaj oficialaj instancoj.

Pro efiko de nia laborado, kiel tiu de guto malgranda *konstante frapante*, sur multaj enlandaj ĵurnaloj kaj gazetoj aperis informoj kaj artikoloj, favoraj kaj objektivaj pri Esperanto. Reliefe menciinda, kiel plej elstara atingajo, estis ege ampleksa raporto en la revuo DOCUMENTA (kajero n.º 1431 - 27 Decembro 1956) oficiala eldonajo de la Ĝenerala Gazetara Direkcio, fakto de la Ministerio por Informado kaj Turismo. Iom post iom falas baroj kaj obstakloj, kio, ebligante nian eniron en superajn rondojn kaj elitajn mediojn, plifortigas la jam akiritajn poziciojn en la popolaj tavoloj. Laŭ tio, estas ĝojigaj faktoj la daŭrigo de Esperanto-Kurso en la Universitato de La Laguna (Kanaria Insularo) kaj la inaŭguro de alia, dum la juĝ pasinta lerno-periodo, en la Universitato de Valencio. Jen du gravaj atingajoj, kiuj malfermas sukcesajn vojojn.

En la olicejo mem, ni ĝoje konstatas kreskantan intereson por Esperanto, ĉar ofte venas petoj kaj demandoj, pri la lingvo kaj Movado, inter atentinde senhaltaj mendoj por gramatikoj kaj vortaroj. Tial, do, la laboro, iom streĉe farita, dum la lastaj naŭ jaroj de nia leĝa ekzisto, ne restis sen fruktoj. Unue, ni kunigis la izolulojn kaj oficialigis ilin; poste, ni vaste diskonigis Esperanton ĝis la nuna favora etapo, ekster duboj kaj miskomprenoj. Ĉi tio nur, per si mem, estus jam bona rezultato; sed fervoraj strebantoj neniam devas halti antaŭ la unuaj fiaskoj, ankaŭ neniel antaŭ la unuaj sukcesoj; pro tio, ni esperas, ke novaj kapablaj personoj klopodos kaj penos antaŭenpasi la nunan stadion, superante ĝin per novaj ideoj kaj novaj metodoj, absolute necesaj por la gravaj respondecaj taskoj plenumendaj de nia Federacio.

ESTRARO

Obeante la statuton, la membraro balotis kaj elektis novan Estraron por la periodo 1957-58. Fakte, la nuna Estraro preskaŭ konsistas el la samaj personoj, kiuj troviĝis en la antaŭa. Tio, vere, signifas, ke ne abundas gvidantoj; t. e. homoj kun iom da kapablo, multe da bonvolemo kaj kelke da oferebla tempo. Pro insista diro, konata estas, por la tuta membraro, la deziro de la Valenciana rondo transdoni al alia urbo la direktilon de nia tutlanda organizo. En paragrafo de la kroniko pri la pasintjara Kongreso (BOLETIN Aŭgusto-Septembro, 4956, paĝo 314) oni povas legi: «Al la demando pri daŭrigo de la Federacio en Valencio, oni decidis unuanime *jes*, ĝis Madrido kapablos transpreni la koncernajn taskojn». La fakto, ke nia nunjara renkontiĝo okazos en Madrido, rajtigas nin esperi, ke la fervoraj kaj kapablaj amikoj tie deĵorantaj progresis en la *kariero* de praktika gvidanteco, survoje al oportuna maturiĝo, por efektiva kaj definitiva nacia estraraneco, eĉ laŭgrade, se pli konvene, post unu-du-tri jaroj.

Pro longa servado de ĉiam preskaŭ la samaj ĝisnunaj zorgantoj en la postenoj de la Federacio, ĝia disvolviĝo iĝas iom monotona; sekve, la asociaj aferoj funkcias tute senŝanĝe, jaron post jaro, en la kadro de jenaj faktoj: Centra Olicejo, Administrado, Bulteno, Gazetara Servo, Kurso per Korespondado kaj Libro-Servo. Jen iom pri ili:

CENTRA OFICEJO

Dum la daŭro de kelkaj jaroj, sindonema membro funde laboris por fiksi kaj ordigi la funkciadon de nia centra oficejo —cerbo de la Federacio— kies taskoj, kiel antaŭe dirite, kreskis pli kaj pli. Tiu amiko, S-ro Ernesto Hurtado, surportis la tutan burokratan laboron preskaŭ sen ekstera helpo. Fine, pro laciĝo kaj pro la bezono zorgi pri la propraj negocoj, li petis anstataŭiĝon. Solvi la problemon, kiun tio prezentis, ne estis facila afero, ĉar la rigora batalo por la vivo ne lasas liberan tempon al tiuj malmultaj bonvoluloj, kiuj, kapablaj kaj spertaj en la oficejaj laboroj, povus volonte kaj senpage ilin plenumi. Post atenta studo, la Estraro vidis solvon nur en la konkreta decido trovi oficiston, kiun ni devas ĉiumonate pagi per adekvata rekompenco. Sed, jen denove la konata malfacilaĵo! Kiel akiri la necesan monon por tiel atentinda elspezo?

Post streĉa cerbumado, oni elpensis kaj aplikis la rimedon voki por ke kvindek volontaj kontribuantoj, po 300 pesetoj, estu la financa bazo por digne pagata oficisto. Fiere kaj kontente ni povas nun laŭte diri, ke la voko ne estis vana, kaj la nomoj de kvindek da samideanoj atestas pri la valora sindonemo de aŭtentikaj idealistoj. Cetere, por iel rekompenci la rekompencintojn, oni asignis kiel premion ĉiumonate, laŭ la Nacia Loterio, kroman kvanton, kio —por la borsortuloj— signifas esti kontribuanto sen kontribuo. Tiel ni sukcesis solvi la aferon por la kuranta jaro; kaj ni esperas, ke en la venontaj jaroj ne mankos apogo al tiu pozitiva fonduso.

Tamen, tio estis unu faceto; alia estis trovi la adekvatan personon por okupi la postenon. Unuanime, la Estraro elektis S-ron Jaime Juan Forné, kiu per antaŭaj helpaj laboroj plenerite gajnis la kandidatecon kaj la elekton. Sed, S-ro Forné, bedaŭrinde, antaŭ unu monato devis rezigni la oficon, pro translokiĝo al Madrido kune kun la firmo, en kiu li profesie laboras. Do, alifoj la Estraro estis devigata serĉi anstataŭanton. Nia nuna oficisto estas S-ro Antonio Collado, kapabla kaj modesta juna samideano, kiu silente laboris plurajn jarojn en la teknika arango de la programoj por la ĉiusemajna Esperantolando en «Radio Alerta» de Valencio. S-ro Collado estos gvidata dum la unuaj monatoj de S-ro Hurtado, kiu afable sin oferis por tio, ĝis la nova oficisto povu mem senĝene mastrumi la oficejon.

ADMINISTRADO

Potenca kavaliro estas Sinjoro Mono, diras malnova proverbo; tio signifas, ke mono estas la kerno de ĉio, kaj neniu idealo povas progresi sen materia bazo. Ni ne estas almozuloj, kaj tamen ni ŝajnas tio jaron post jaro, kiam ni devas raporti pri la financa situacio, ĉar bedaŭrinde foje kaj foje ni devas ripetiti la tro konatajn kaj tro enuigajn vortojn, ke la grandaj elspezoj, pro daŭra altiĝo de la kostoj, manĝegas la etajn enspezojn, kiujn liveras nia ĝisnuna kotizo. Se objektivite vi studas la aferon, vi mem konkludos, ke certe ni faras miraklojn por sukcese trapasi la jaron sen deficito.

Jam du jarojn daŭras la sama kotizo de 50 pesetoj. Dank' al la tre bonvena donaco de la Zaragoza Kongreso, ni povis ekvilibrigi la budĝeton, sed la fonto elĉerpiĝas kaj ni devas trovi novajn rezerveojn por niaj kontoj. Laŭ distribuita demando aŭ balotilo, kiun certe vi ricevis, nur du rimedoj eblas: plialtigi la enspezojn aŭ redukti la elspezojn! La efektivaj enspezoj konsistas —vi jam scias— el la regulaj kotizoj; la ĉefa elspezo estas la kostoj por eldoni kaj dissendi nian bultenon. La tuta membraro, espereble, respondos; kaj la kongreso, akorde kun la ĝenerala opinio, juĝos kaj findecidos.

BULTENO

S-ro Juan Bosch, post tri jaroj de plene kontentiga redaktado, petis eksiĝon pro postuloj de lia profesio, kiu ne plu lasas al li liberan tempon. S-ro Luis Hernandez sin oferis duan fojon por la gvida posteno de nia brava BOLETIN, kiu gajnis prestiĝon eĉ ekster la limoj de nia Federacio; atestas pri tio la multaj ricevitaj laŭdoj por la aprila centa numero, vera juvelo por nia jubileo kaj por la tuta kolekto de nia oficiala organo. Plendetala raporto estos legata, de la redaktoro mem, en la kongreso.

GAZETARA SERVO

Ĉi tiu treege utila servo daŭras ankoraŭ sub la zorgoj de nia nelacigebla S-ano, S-ro Dario Rodríguez, kiu ordigas la grandan kvanton da artikoloj kaj sciigoj pri

Esperanto aperintaj en la hispana gazetaro. Malaperis la antaŭa mokmaniero, nun ĉiuj mencioj estas seriozaj, objektivaj kaj respektemaj, kiam ne absolute favoraj.

KURSOJ PER KORESPONDADO

Alia bravulo, S-ro Ramón Molera, kun la valora helpo de pluraj kapablaj junuloj el Moyá, majstre gvidas ĉi tiun intelektan motoron de nia Federacio, dank' al ĝi, eĉ en plej foraj anguloj de nia lando, oni lernas kaj studas nian karan lingvon. Grava atingajo estis la oficiala rekono fare de la Ministerio por Nacia Edukado, kio ebligas ĝian regulan funkciadon. Ni estas certaj, ke la kursoj per korespondado estas la komplemento de nia plej konkreta celo, en grupoj aŭ randoj: instrui kaj instruadi Esperanton. Cetere, post la oficiala rekono, ĉi tiu fako eniras en novan periodon de fruktodona matureco, en kreskanta progreso, kun la apogo de ĉiuj membroj, kiuj devas esti ĝiaj propagandistoj.

LIBRO - SERVO

Ankaŭ ĉi tiu Servo troviĝas iom ekster la ĝeneralaj zorgoj de la Federacio, ĉar sub la gvido de S-ro E. Hurtado, ĝi havas apartan reton da korespondantoj, kio ebligas rektajn rilatojn kun la plej gravaj eldonejoj por plenumi ĉiujn mendojn pri esperantaj libroj, laŭ plej favoraj kondiĉoj.

VORTARO

Jam de pluraj jaroj, estis daŭre aktuala temo la eldono de plena hispana-esperanta Vortaro, kies materialon pretigas S-roj Luis Mimó, el Sabadell, kaj S. Gumá, el Reus; pro ilia zorga ellaborado, tiu materialo ankoraŭ ne estas finarangita. Sed, por solvi *jam nun* la problemon, dank' al klopodoj kaj financa helpo de kelkaj fervoruloj, aperis antaŭ unu jaro la utila Vortaro, kiun diligente kaj sperte faris D-ro Tudela. Nu, la verko ekzistas, sed post la unuaj viglaj mendoj, la stoko ne tre rapide disvendigas. Tio estas evidenta baro, kiu malhelpas la eldonon de la dua parto, la esperanta-hispana, kies manuskripto jam estas preta, atendante aktive kuŝi apud klavaro de linotipo.

Antaŭ ol fermi la nunjaran raporton, jen ankoraŭ du aferoj: U. E. A. pasintjare starigis la Junularan Fakon, kiun ĉiel ni devas vivigi. Tiucele, ni alvokas ĉiujn junajn membrojn de nia Federacio fondi la koncernan nacian sekcion, kiu, en rilato kun la internacia, certe liveros bonegajn rezultatojn, inter la junularaj medioj.

La dua afero estas la grava sciigo, ke, eble, en la jaro 1960, okazos en Barcelono la Universala Kongreso; antaŭ tio, ni instigas ĉiujn federacianojn kaj ĉiujn hispanajn esperantistojn al oportuna laboro, kun unuigitaj fortoj, ĉirkaŭ la akso de nia Federacio, por inde akcepti kaj digne plenumi la respondecon de tiel granda entrepreno.

Jen do, en konciza formo, la resumo de nia laboro, kiun ni submetas al la konsidero de la tuta membraro, atendante rimarkojn, sugestojn kaj opiniojn por povi piloti, laŭ plej kontentiga maniero, kun flirtanta flago, la ŝipon de la hispana esperantismo.

La Prezidanto, D-ro Rafael Herrero

La Sekretario, José Guzmán

18^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN MADRIDO - 23-28 JULIO 1957

Oficialaj adresoj: Costa Rica, 20 - bajo A aŭ Apartado 19.029 - MADRID

La Organiza Komitato febre laboras por kontentige prepari ĉiujn punktojn de la Programo, al kiu oni devas aldoni prelegon de akademiano S-ro J. Régulo Pérez, kiu disertos pri la temo «La Problemo de Internacia Lingvo». La aŭtoritatoj montriĝas vere favoraj al la kongreso kaj promesis valorajn kaj ĝentilajn donacojn: ĉiuj kongresanoj estos regalataj per lunĉo de la Provinca Deputitaro; ankaŭ ili ĝuos senpagan eniron en la Prado-Muzeo kaj en «El Escorial». Oni atendas la efektivan ĉeeston de pluraj gravuloj, kiuj simpatias al nia Movado. Tial, la Organiza Komitato insiste rekomendas al ĉiuj nepre partopreni kun konvena vestaĵo ĉiujn arangojn, laŭ nia modela disciplino, kio neniel malhelpos amuzon kaj bonan humoron, en gaja samideaneco. La akceptejoj, kiel dirite, funkeios la tutan tagon, marde, 23, ĉe «Centro Asturiano», strato Arenal, 9.

..... SPINA, ETRUSKA URBO REVIVIGANTA

Ĵusaj arkeologiaj eltrovoj povas efektive pravigi la diinon; ĉiutage oni elfosas artajn objektojn: kolringojn, armilojn, vazojn k. t. p. el la etruskaj tomboj, kiuj kuŝas sub la ŝlimo de «Valli di Comacchio» riĉaj fiŝkulturejoj, apud la adriatika marbordo, en delta regiono de rivero Po.

Oni sciis de longe, ke en tiuj ĉirkaŭaĵoj devas ekzisti la restaĵoj de antikvaj etruskaj urboj, kaŝitaj kelkajn futojn sub la tero aŭ sub la akvonivelo. De tempo al tempo, oni trovis kelkajn objektojn, kiuj pravigis tiun opinion. Cetere, en latinaj klasikaj verkoj estas menciita la ekzisto de grava urbo Spina, ĝuste sur la loko, kie okazadas la diritaj eltrovoj.

Nur de malmultaj jaroj, oni pliampleksigis la serĉojn kaj interesiĝis la kompetentaj instancoj; oni faris eĉ peraviadilajn fotografadojn por plej bone enlimigi la ĉjon. Riĉa frukto de tioma laboro estis la eltrovo de tiu legenda urbo. Spina revenas el la antikva epoko kun abundaj atestoj pri la vivo kaj civilizo de Etruskio.

La trovoj konsistas ĉefe el tomboj, kaj pri tio mi deziras nun rakonti. La kulto por la tomboj, tre zorge konstruitaj kaj

ornamitaj, klare pravas, ke Etruskoj agnoskis alian vivon postmortan, vivon de premio aŭ puno, laŭ la ecoj de l' mortinto. La etruskaj tomboj aspektas kiel etaj domoj. Pordetoj kun kolonaj fostoĵoj kondukas al la tombaj ĉambroj, kie estas litoj sur kiuj kuŝis la kadavroj. Etruskoj metis ofte en la tombojn, kun la mortinto, ankaŭ liajn objektojn, kredante, ke ili utilos al li ankaŭ post la morto. Tie, oni trovis bronzaĵojn, objektojn el oro kaj eburo, grandajn vazojn lerte pentritajn, terpotojn k. t. p.

Sur la ruĝa fono de la muroj siluetas nigraj figuroj tra pentritaj scenoj de ordinara vivo kaj festoj aŭ ĉasado, krom diversaj aliaj temoj, kiuj ebligas koni la religiajn kredojn kaj karakterizajn kutimojn de la tiutempa etruska vivmaniero.


Daŭre ŝvebas, interne de la tomboj, la mistera esenco de la etruska religio. Oni scias, ke Etruskoj konsideris la aeron svarmanta je spiritoj, bonaj kaj malbonaj; kaj en iliaj mitoj ludis gravan rolon la animoj de la prauloj, al kiuj oni dediĉis preĝojn kaj oferojn. Ĉiu natura fenomeno estis interpretata kiel ago de tiaj spiritoj; kaj tio klarigas la zorgon, kiun Etruskoj havis por la tomboj, ĉar ili kredis, agante tiel, altiri al si la bonvolan protekton kaj ŝirmon de la praulaj spiritoj.

Jen, malmultvorte, kion mute rakontas la etruskaj tomboj, kiel religiaj monumentoj. Sed la etruska vivo montriĝas plur-aspekta, kaj estus tro longe paroli sufiĉe kontentige pri ĉiuj ĝiaj apartaj aspektoj.

Aliajn fojonojn, se mi ne tedis vin, mi daŭrigos mian babildon.

AUGUSTO BALOSSINO

Via Costanza, 22 - Milano (Italia)



Interno de tombo etruska

SAMIDEANA AKTIVECO

En Literatura-Muzika Vespero, ĉe la Sporta Klubo de Eibar, la 11^{an} de pasinta Junio, nia fervore diligenta samideano Santiago Arizmendi paroladis antaŭ la multenombra publiko, kiu havis okazon aŭdi pri la riĉa literaturo, kiun Esperanto posedas, en senfina vico, post la mirindaj kaj geniaj tradukoj, kiujn D-ro Zamenhof faris el la fundamentaj verkoj de la universala literaturo. S-ro Arizmendi estis tre atente aŭskultata de la ĉeestantoj.

Kompetento pri naciaj lingvoj
ne donas kompetenton pri la
Internacia Lingvo.

RETTO ROSSETTI

SFINKSA ANGULETO

LA LIBROVERMO

En biblioteko staras granda duvoluma verko. La foliaro de ĉiu volumo estas 5 cm. dika, ĉiu librokovrilo $\frac{1}{2}$ cm. Inter la kovraĵo kaj la unua folio de la unua volumo troviĝas librovermo, kiu mordetante trapenetras la verkon, ĝis ĝi alvenas inter la kovraĵo kaj la lasta folio de la dua volumo. Kiun longon havas la vojo, kiun ĝi entute trapasis?

Ĝusta solvo gajnos tri poentojn ĝis 15. Septembro.

SOLVO PRI LA NUMERA LUDO
EN LA PASINTA NUMERO

Oni dividas 7 per 7. Oni aldonas plian 7 al 1 de la kvociento, kaj la rezultantan sumon oni multobligas per la lasta dispo-
nebla 7, laŭ jena formulo:

$$7 : 7 = 1 + 7 = 8 \times 7 = 56$$

GRUK de Kumbel. Esperanto - Eldono de Poul Thorsen, laŭ Centra Dana Esperantista Ligo. 72 paĝoj 10 x 16 cm. Prezo ne indikita.

Grukoj! Kumbel! Du enigmaj vortoj; sed pri tio klarigas la antaŭvortoj: Kumbel estas pseŭdonomo de dana inĝeniero, serioza ŝercemulo, Piet Kein (naskiĝinta en 1905)... Pri la signifo de la vorto regas ioma dubo, eble ĝi estas artefaritaĵo de la aŭtoro; eble ĝi troviĝis jam sur antikvaj runŝtonoj, kun signifo *memorindaĵo*. GRUKO estas kuntiriĝo de du danaj vortoj: ridoĝemo. La aŭtoro verkis pli ol 5000 grukojn, aperintajn en la grava dana ĵurnalo «Politiken», kompreneble multajn temis pri naciaj kaj urbaj aferoj, kaj ne interesus la internacian publikon. El tiu granda Grukaro, la tradukinto elprenis 66, kiuj hodiaŭ aperas en Esperanta eldono de mil ekzempleroj. La danaj eldonoj atingis ja la nombrom de 165.700 ekzempleroj.

Ili estas malgrandaj versaretoj, plejparte kvarversaj strofoj, ili iom rememorigas, pro la koncizo kaj pro la enhavo, la «Humoradas» de la hispana poeto Campoamor. La aŭtoro pritraktas ĉiajn temojn: humorajn, filozofiajn, politikajn, satirajn; ĝenerale optimiste, ĉar, samkiel li ĵesas en la 36^a:

La temp' terura estas, ve!
Sed optimisto restas mi ĝis oste
Konsolas min konstante, ke
pli bone estas nun ol iĝos poste.

Kaj ĉiam Kumbel verkas sprite, sale, pipe, ne tute prude; sed neniam ŝoke.

Pasintjare, mi recenzis pri alia verko de la meritoplena samideano Poul Thorsen, kaj mi pensas, ke ne estas necese rediri, ke li trafis uzas ĉiun rimedon de la tradukarto, kelkfoje ankaŭ asonancojn kaj senperajn verbojn, ne multajn neologismojn (neniun novan en ĉi tiu verko) kaj bonajn kunmetaĵojn. Materiale, la verko estas alloga libreto; la aŭtoro, bonega desegnano, faris por ĉiu Gruko traŝan vinjeton, ilustrantan tion, «*kion apenaŭ oni imagis illustrebla*» (P. T.). Ha... kaj la papero estas sendube ne porciĝata en Danujo: la libreto —tre taŭga kaj trafa por donaco— havas duoblan paperon kaj kompreneble, duoblan pezon kaj duoblan valoron. Kial?

Eble la leganto pensas: Ĉu humora verko meritas tiel longan recenziĝon? Respondas por mi la unua Gruko:

Kiu ŝercon ŝerce prenas
kaj severon nur serioze,
Tiu fakto malkomprenas
ambaŭ grandioze.

ĈIRKAŬ LA NASKIĜO DE MIA MISIO, de Martinus. El la dana originalo tradukis C. Graversen kaj kontrolis la Literaturo Komitato de SAT. Formato 13 x 19 cm. Bindita en verda tolkovrilo kun ora simbolo, 57 paĝoj. Eldono de Spirit-scienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej, 94-96, Kopenhago F. (Danujo). Prezo 6'50 danaj kronoj.

Antaŭ ĉio ni rimarkigu, ke la aŭtoro avertas en sia verko, jam la 4^a tradukita en la internacia lingvo, ke li ne sin turnas al kreduloj, kiuj ricevdas la spiritan pacon en sia religio. Ankaŭ ne li sin direktas al materiistaj intelektuloj, ĉar por nekredantoj, la ideoj pri senmorteco kaj dingo, estas nura fantazio. La incinto de la Spiritita Scienco turniĝas al tiuj homoj kun emancipita menso, dezirantaj penetri la enigmojn de la naturo, sed kies scienca edukado ne permesas al ili plenkredi, tial ke ili bezonas palpeblajn pruvojn pri la grandaj misteroj de la ekzistado.

Martinus rakontas en ĉi tiu libro, kial li sin dediĉis al la instruado de la Spiritita Scienco. Li deklaras serioze, ke la Sankta Spirito sin manifestis al li, kaj de simpla kontoristo, li fariĝis kapabla montri per sciencaj analizoj, ke la eternaj leĝoj de la Universo identiĝas kun la scienco kaj la amo. La verkinto ne komprenas, kial multaj religianoj opinias, ke revelacioj apartenas nur al pratempo, kaj ke similaj fenomenoj ne povas manifestiĝi nuntempe, eĉ al plej modesta homo, kiel okazis al li mem, meze de nia epoko de moderna scienco kaj tekniko. La granda kosmologo certigas, ke tia fenomeno ne estas io mirakla, sed realaĵo, kiun oni povas analizi; kaj por evidentigi tion, li donas detalojn de sia propra revelacio.

La kreinto de ĉi tiu nova mondkoncepto celas malkaŝi al la homoj la sekretojn de la vivo, farante el kredo, konvinkon, el nescio, scion, kaj el religio, sciencon. La libro do liveras multon pripensindan; sed, kiel dirite, ĝi estas destinita al liberkredanoj. Tamen, kiel samideanoj, ni devas kuragi la Esperanto-Sekcion de la Spirit-scienca Instituto, por ke ĝi daŭre aperigu la verkojn de tiu, se ne mondsavanto, certe mondsaĝulo, kaj ni povu konigi kun liaj sciencaj analizoj; ĉar, se vere Martinus kapablas solvi la enigmojn de la vivo, li certe demetis multajn laborojn de sur la dorna vojo de la homaro, tial ke, kiel diris poeto, ĉio surtera estas mistera, kaj ĉio superlima, sublima... Aŭ ĉio estas mis-tera kaj sub-lima?...
R. QUILES

GRANDA KUNVENO DE LA BARCELONA ESPERANTISTARO

Sekve de alvoko, aperinta en nia mŝa numero, okazis taŝge aranĝita kunveno en la ejo de Kooperativo de Muntekstoj, kie sidas la grupo «Stelo de Paco». Ĉeestis nombraj delegacioj de «Kooperativo, La Formiko», «Aŭroro», «Casa de Almeria», «Casa Valencia», «Nigra Monto», «Peña Cultural Barcelona» kaj «Radio Club de Cataluña» krom la du organizoj, en kies ejo oni kunvenis. Prezidis D-ro Atanasio Sinués, pastro kaj gimnazia profesoro. S-ro Pablo Claramunt malfermis la kunvenon, salutis la ĉeestantaron kaj klarigis la celon de la kunvoko: doni vivon al INSTITUTO DE ESPERANTO, sub kies egido brile kaj vikle disvolviĝos ĉiuj Barcelonaj Esperanto-Grupoj. Poste parolis laŭvice Francese Vilá, Rafael Gisbert, Jozefo Inglaŝa kaj Sebastia Alberich; ankaŭ S-ro Pablo Claramunt parolis refoje por trafe pritrakti la ekonomian aspekton de la nova organizo. La prezidanto fermis la kunvenon per bela parolado, instigante ĉiujn al la laboro por doni superan rangon kaj prestiĝon al Esperanto en Barcelono, kie ŝajne ekzistas, ankoraŭ ekster ĉia organizo, kelkaj centoj da esperantistoj, kiujn nepre oni devas varbi por la ekzistantaj grupoj. En venontaj numeroj, ni raportos pli detale pri la grava evento.

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a JULIO 1957)

Suma anterior.....	2.848 Ptas.
F. Parra - Valencia	5 »
E. Costa - Sardaňola	25 »
R. Ayala - Barcelona	5 »
J. Montfort - Barce ona	5 »
L. Pérez Requena - Valencia	100 »
Total	2.988 »

¡Muchas gracias y felices vacaciones!

TESORERIA

En el sorteo del 25 de Junio, por el número 19.383, fué agraciado con las 250 pesetas el Vice-Presidente de la Federación, Dr. D. Mariano Solá, de Tarrasa, por su n.º 83

Esta Tesorería advierte que, como de costumbre, el próximo número extraordinario del Congreso será enviado a reembolso, por el importe de la cuota anual, a todos los afiliados que están todavía pendientes de este requisito. Confiamos en su buena voluntad.

GRAVA ATENTIGO

Kiel kutime, pro somera libertempo de la redaktoroj, dum monato Aŭgusto, nia Bulteno NE aperos. La proksima numero, kiel eksterordinara kongresa numero, kun densa kaj elektita enhavo, ne vizitos vin denove ĝis mezo aŭ fino de venonta 9a septembro. Bonvolu atenti pri tio! Agrablan ripozon al ĉiuj!

LA NICA LITERATURA REVUO

sub ĉefredaktoreco de

Profesoro G. Waringhien

32/40 paĝa - poŝformato

Jarabono: 45 pesetoj

Hispana abonejo: S-ro J. Régulo Pérez

Apartado, 25 - LA LAGUNA (Tenerife)

Kanariaj Insuloj

Petu senpagan specimenon al la administranto S-ro R. Fiquet - 5, Bd. Stalingrad - NICE (A-M) Francio

ANONCETOJ

Kiel flugmaŝina teknikisto, mi interesiĝas pri adresoj de hispanaj esperantistaj teknikistoj, kiuj volas per korespondado interŝanĝi teknikajn spertojn kaj diversajn informojn pri flugmaŝinfabrikado.

Bonvolu skribi al:

S-ro Wim Balleux, 60 Menegemlei, Deurne-Zuid — ANTWERPEN (Belgujo)

Dezirus korespondadi kun hispanoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi p. m. kaj il. pk. S-ro Paul Müller, str. Friedhofstrasse, 5 (10 a) WILKAU-HASSLAU (SA) Germanio

Bankoficisto 34-jara dez. korespondi kun tutmondaj geesperantistoj. Skribu al S-ro Ricardo de la Cruz-Layana Puerta Nueva, n.º 22, 3.º - Barcelona Ĉi tiu anonco validas ĉiam.

Itala tramvoĝisto deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Skribu al S-ro Ettore SALMI Via Francesco Albani, 22 BOLOGNA (Italia)

to ekspedi ĉi tiun numeron, la ADRESARO estas jam en la fazo de lasta manile, post tri aŭ kvar tagoj, ni povos liveri al la federaciaj tiun atendatan libreton